

Laŭokaza Novaĵletero.

Organo de la

Internacia
Komerca kaj Ekonomia
Fakgrupo.

P.O.Kesto 25041,
3001HA Rotterdam,
Nederlando.

Numero 6;

junio, 1985.

Formala alvoko.

IKEF Invitas VIN Al

La Oficiala Fondkunveno de la
Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo,
kiu okazos je
mardo, la 6-a de aŭgusto, 1985,
en Salono Ziegler je la 14-a horo,
en la kadro de la
70-a Universala Kongreso de Esperanto,
en Aŭgsburgo.

La Prezidanto de IKEF, S-ro Franz Josef Braun,
prezidos la kunsidon.

TAGORDO

1. Malfermo kaj salutvortoj de la Prezidanto;
2. Prezento de la agadprogramo de IKEF,
kaj raporto(j) pri ĝisnunaj laboroj;
3. Prezento de la proponita Statuto;

- paŭzo -

- 4a Adopto de la Statuto;
- 4b Elekto de Estraranoj;
5. Proponoj por konsidero, al la Estraro;
6. Fermo.

Nota: Partopreno en iu eventuala voĉdonado dum punkto 4 estos strikte limigita al Membroj de IKEF. Tial, dum la paŭzo oni ebligos al kandidatoj por membreco plenumi la necesajn formalajn, (plenigi aliĝilon kaj pagi kotizon).

Laŭeblaj okazoj al ne-Membroj prikomenti la agadprogramon kaj Statuton estos donitaj dum punktoj 2 kaj 3 antaŭ la paŭzo.

Rotterdam,
1985-06-15.

Nome de la
Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo,
Lawrence Mee, Ĝenerala Sekretario.

S T A T U T O

de la

Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo.

1. Tiu ĉi Statuto aludas al unuiĝo kun la titolo, Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo, por kiu taŭga mallongigo estas IKEF, aŭ en la nuna teksto: la Fakgrupo.

2. La Fakgrupo konsistas el Esperantistaj organizaĵoj kaj individuaj personoj. La sidejo de la Fakgrupo estas en Rotterdam, sed translokiĝo de la sidejo eblas, se necesa pro ŝanĝo en la cirkonstancoj de la Fakgrupo.

3. La Fakgrupo havas la ĝeneralan celon disvastigi la uzadon de la internacia lingvo, Esperanto, kaj plifaciligi ĉiuspecajn rilatojn inter la homoj en la kampoj de komerco, ekonomio kaj ekonomia scienco, indifereinte pri la nacieco, ŝtataneco, raso, religio, politika sinteno kaj gepatra lingvo de la individuaj homoj.

4.1 La Fakgrupo provas atingi tiun ĉi celon per jenaj agadoj:

4.1.1 apogado ĝenerale al ekzistantaj Esperantistaj organizaĵoj, kun aparte favora apogado al tiuj organizaĵoj kiuj aŭ instruas la lingvon aŭ provas ebligi pli altnivelan konon de la lingvo per fakaj vortaroj kaj studlibroj;

4.1.2 agadoj por ebligi la eldonadon de faka terminaro por la kampoj de komerco kaj ekonomiko, kaj la daŭran laboron ĝisdatigi tian terminaron;

4.1.3 agadoj por ebligi renkontiĝojn de Membroj de la Fakgrupo kaj por starigi studseminariojn je kiuj estu prezentataj referaĵoj pri esploroj faritaj en la apartaj kampoj de komercaj rilatoj kaj ekonomiko;

4.1.4 subtenado de Membroj agantaj por aranĝi negocojn inter si aŭ inter ĉiuspecaj organizaĵoj uzante la internacian lingvon, Esperanto;

4.1.5 eldonado de faka bulteno aŭ de alia formo de revuo, kaj/aŭ subtenado de aliaj revuoj, precipe per varbado de reklamanoncoj, (ekzemple de entreprenoj), en la internacia lingvo, Esperanto, kaj verkado de fakaj artikoloj;

4.1.6 laŭebla subtenado de ĉiuj agadoj de Esperantistoj pliakrigi konscion de la valoro de Esperanto en niaj apartaj kampoj de intereso, kaj

4.1.7 aplikado de aliaj jure permesitaj rimedoj, kiuj alproksimigas la celon de la Fakgrupo.

4.2 Por la plenumo de sia celo, la Fakgrupo rajtas akcepti aŭ akiri proprajn, akumuli kapitalon, fari investojn, ricevi rentojn kaj dividendojn el investoj faritaj, kaj dungiti oficistojn.

5. La oficiala lingvo de la Fakgrupo estas la Zamenhofa lingvo, Esperanto, tia kia ĝi estas difinita per la Fundamento de Esperanto kaj oficialigita per la Akademio de Esperanto.

6.1 Ordinaraĵoj Membroj de la Fakgrupo povas esti:

- (a) Ĉiu individua persono kiu subtenas la celon kaj pretas akcepti ĉiujn devojn priskribitajn en tiu ĉi Statuto, kaj
- (b) Ĉiuspecaj organizaĵoj kiuj uzas aŭ pretas uzi la internacian lingvon, Esperanto, por komercaj rilatoj kaj ekonomiaj interŝanĝoj.

Principe, ĉiu Membro havas la rajton je unu voĉo en iu voĉdonado, ĉu pri ŝanĝo en tiu ĉi Statuto, ĉu pri iu alia decido, kiu leviĝas el aplikado de tiu ĉi Statuto.

Membreco aŭtomate implicas la devon finance kontribui regule al la mastrumado de la Fakgrupo.

6.2 Honoraj Membroj de la Fakgrupo povas esti tiuj individuaj personoj kiuj pro rekonataj meritoj por la Fakgrupo estas invitetaj akcepti honoran membrecon sekve de unuanima decido de la ceteraj membroj dum ĝenerala kunveno aŭ per poŝta voĉdonado.

Honora Membreco ne implicas la devon fari regulajn kontribuojn al la kazo de la Fakgrupo.

7.1 La gvidado de la Fakgrupo estas konfidata al Estraro, elektita de la Ordinaraĵoj kaj Honoraj Membroj de IKEF inter si. Estrarano tenas sian oficon por du jaroj ekde elekto, sed rajtas prezentigi por re-elekto.

7.2 La Estraro konsistas el Prezidanto, Ĝenerala Sekretario kaj du ĝis kvin aliaj Estraranoj, inkluzive de Vicprezidanto kaj Financa Konsilanto.

7.2.1 La Prezidanto reprezentas la Fakgrupon, kaj subskribas kun la Ĝenerala Sekretario la ĉefajn dokumentojn. La Prezidanto prezidas en la Estraro kaj en ĝeneralaj kunvenoj, sed rajtas portempe transdoni tiun prezidan rolon al Vicprezidanto se necese.

7.2.2 La Ĝenerala Sekretario: (a) zorgas pri la efektivigo de la decidoj de la Estraro; (b) proponas al la Estraro iniciatojn por decido, kaj (c) ĝenerale prizorgas la eksterajn rilatojn de la Fakgrupo.

7.3 La kazon de la Fakgrupo prizorgas la Financa Konsilanto, (aŭ la Ĝenerala Sekretario en anstataŭo), kiu krome regule raportas al la Estraro pri la evoluo de la fakgrupaj financoj.

7.4 La Estraro kunmetas ĉiujare raporton pri la agadoj de la Fakgrupo, inkluzive de revizora raporto pri la kaskontotenado, kaj tiun kombinitan raporton prezentas por aprobo al la Membraro. Publikigo de la raporto devas okazi en la daŭro de maksimume kvar monatoj post la finiĝo de la kalendara jaro, al kiu ĝi rilatas. Aprobo de la raporto sekvas aŭtomate, krom se pli ol duono de la membroj volas re-sendigi ĝin al la Estraro por re-verkado.

8. Ĝeneralaj kunvenoj de la membroj okazu principe unufoje dum la jaro, prefere en la kadro de Universala Kongreso aŭ dum simila manifestacio de la Esperantista publiko. La ĝeneralaj kunvenoj estas okazoj ne nur por doni aprobon al la jarraporto kaj elekti la Estraron, sed ankaŭ por aŭdigi kaj diskutigi referaĵojn pri fakaj esploroj faritaj de Membroj. Elekto de membroj de la Estraro okazas per skriba voĉdonado per poŝta, se ne eblas en aparta jaro okazigi ĝeneralan kunvenon.

9. En okazo de dissolvo de la Fakgrupo, la Estraro nomas komisionon, kiu likvidas la kurantajn aferojn kaj ordigas la restantajn havaĵojn.

INTERKONATIĜO

Ĉi-foje ni bonvenigas nur unu novan membron por nia membro-listo, sed tamen la okazo havas propran intereson, ĉar S-ro Derks estas nederlandano loĝanta en sia propra lando, dum la aliaj du membroj loĝantaj en Nederlando estas ambaŭ britoj, nur portempe loĝantaj en la lando de digo kaj ventmueliloj.

Membro-listo je 1985 - 06 - 15.

22. Derks, S-ro W.J.H., ekonomia konsilanto; direktoro de kompanio;
Limbrichterstraat 60, 6131 EE Sittard, Nederlando.

Ni jam raportis, ke niaj membroj troviĝas en dek unu landoj. Lastatempe, sin anoncis kandidatoj por membreco el du aliaj landoj, sed por ili bezonas ankoraŭ iom da tempo antaŭ ol ni povos ilin aldoni al nia membro-listo. Krome, ni daŭre tenas kontaktojn kun kandidatoj por membreco en landoj de kie ne eblas fari transpagojn mono. Ankoraŭfoje ni rekomendas al niaj membroj en la tiel-nomataj 'pagipovaj' landoj, pensi pri la agrabla ago fari mondonacon al nia Subtena Fondaĵo, por ebligi al ni proponi membrecon al tiuj, por kiuj internaciaj kontaktoj havas apartan gravon.

En la nuna etapo de evoluo por nia Fakgrupo, la plej grava tasko estas ankoraŭ tiu de varbado de novaj membroj. Kiel atentigis nin nia Prezidanto, en la lasta Novaĵletero, tiu ĉi estas tasko, kiu bezonas la aktivan kunlaboron kaj strebadon de ĉiuj niaj membroj, por ke la eblecoj latentaj en internacia organizo iom post iom realigu.

Niaj nunaj membroj estas kvazaŭ reprezentantoj de la Fakgrupo en la propra lando, kaj kreskado de la membreco en tiu lando dependas je ili, kun la fona subteno kaj aktiva helpo de la centra 'oficejo'.

--oOo--

Niaj mecenatoj.

Denove ni esprimas kun plezuro dankojn pro valora donaco al nia Biblioteko. Ĉi-foje temas pri du eldonoj de baze la sama verko, manlibro pri komerca korespondado, eldonita unue iom antaŭ 1926 de la eldonejo Langenscheidt, en Berlino, Okc. Germanio.

La versioj kiujn ni ricevis estas ekzemplero de la dua eldono, de 1926, germana-rusa, kaj ekzemplero de la dek-sepa eldono, de 1957, germana-angla kaj inverse. Ni konstatas, ke versioj de la sama manlibro estas haveblaj en aliaj lingvoj.

La donacinto estas S-ro Franz Schneider, kiu jam pasintjare faris al la Fakgrupo la valoran donacon de ekzemplero de la plej unua verko ĉirka terminaro en Esperanto, tiu de Kreuz kaj Mazzolini. Se kaj kiam la vera terminologia laboro de la Fakgrupo efektive komenciĝos, ĉiuj tiuj ĉi verkoj estos valoraj fontoj de esprimoj kaj parolturnoj, kaj en la nomo de la Fakgrupo mi etendas al S-ro Schneider tre varmajn dankojn. Eksciante, ke lastatempe S-ro Schneider, nun grandaĝa, iom malsanas, ni sendas al li apartajn bondezirojn de nia ĉiuj.

--oOo--

Pri pagoj al ni.

IKEP ankoraŭ uzas la poŝtĉekkonton, 361 47 95, en Nederlando de Mondkomerca Eldonejo Esperantista, je la adreso:

P.O. Kesto 25041, 3001 HA Rotterdam.

Bonvolu adresi internaciajn poŝtmandatojn same. La kotizo restas je dudek guldenoj por 1985, kaj tre bonvenaj ankaŭ estus pagoj por pluraj jaroj en anticipo. Anticipa pago de kotizo por dudek jaroj aŭtomate alportas la privilegiojn de Dumviva Membreco.

--oOo--

Pensoj de pseŭdoredaktoro.

En la angla lingvo, konata oni-diro iras kiel: kelkaj naskiĝas jam fame konataj: aliaj akiras famon pro propraj meritoj, kaj kelkaj ne havas elekton ol akcepti famon pro cirkonstancoj. En tiu lasta kategorio, ŝajnas al mi, troviĝas kelkaj el la multaj Redaktoroj konataj al la E.-Movado.

Inter ili - se efektive mi pravas en tio, ke famo jam venis al mi - troviĝas mi pro la Novaĵleteroj de IKEF.

Ni tuj notu, ke mi ne pretendas al meritoj en la kampo de redaktorado; en la realo, la okazoj ĵe kiuj mi havas ŝancon montri saĝecon selekti iun artikolon por aperigo kaj rifuzi aliajn, kiel, (laŭ oni-diro), faras la veraj redaktoroj, estas tre maloftaj. Krom verki mem la pli grandan parton de ĉiu Novaĵletero, mia tasko limiĝas al normigo de proponitaj tekstoj kun foja korektado de esprimo aŭ gramatikaĵo. Sed lastatempe venis al mi atentigoj pri normigadoj miaj en lastatempaj artikoloj; ŝajnas necese surpaperigi, kaj por tiuj plendetoj kaj por estontaj aŭtoroj, la ĉefajn 'normojn' kiujn mi aplikas, kiam mi re-tajpas por aperigo tekstojn proprajn aŭ proponitajn por la Novaĵletero.

La unua konstato devas esti, ke mi provas, kiel eble plej diligente btenigi kaj apliki la Fundamenton Esperanto. Sekvas, ke mi severe senescepte uzas la Zamenhofan alfabeton; krom foje por literumi personan nomon, la 28 literoj de la laŭ-Fundamenta alfabeto plene sufiĉas por mi. (Parenteze mi atentigu, ke ambaŭ skribmaŝinoj disponeblaj al mi por la laboro estas provizitaj, laŭ miaj propraj mendoj, per la necesaj supersignoj, ebligante kreon de ĉiuj literoj.)

Sekvas, ankaŭ, ke mi provas senescepte apliki la konsilojn de la Akademio de Esperanto.

Por kontroli mian lingvo-uzadon mi referencas al Plena Vortaro de Esperanto. Konstatante, ke tiu tre valora verko jam antaŭ pluraj

jaroj fariĝis malmoderna, ne plej malgrave pro la Aktoj de la Akademio, mi provis jam du-foje instigi al SAT la ĝisdatigon kaj re-eldonon de la 'PV'. (Ĝis nun la Plenumkomitato de SAT ne konvinkiĝis pri tiu neceso; jen taŭga ago por niaj membroj: skribu proprainiciate al SAT proponante tian re-eldonan taskon.)

Foje, oni provas konsili al mi uzi PIV-n anstataŭ PV-n; mia respondo estas, ke PIV estas multe tro multekosta, multe tro dika kaj multe tro peza, kaj krome, ke ĝi estas malpli fidinda ol PV en pluraj rilatoj. (Ni revenos al tiu ĉi temo poste en la artikolo.)

De teknikaj vortaroj mi disponas pri kelkaj. Por nia propra kampo la ĉefa vortaro estas, kompreneble, la Internacia Komerca-Ekonomika Vortaro, IKEV, sed ankaŭ tiu vortaro ne estas absolute fidinda, kaj, ĉefe, ĝi suferas pro manko de multaj relative lastatempaj nocioj.

Aparte grava, (kvankam ne ĝis nun rilate al komerco aŭ ekonomio), estas la Slipara Vortaro de la TC de ISAE. Bedaŭrinde, jam montriĝas, ke la ĝisdatiga laboro grande lamas; estas demando, ĉu ankaŭ tiu valora iniciato perdiĝos pro manko de informita subteno.

Ankoraŭ pensante pri normoj en lingvo-uzado, mi agnoskas mian grandan bonŝancon en tio, ke mia edzino pretas dividi kun mi siajn grandajn konojn de la internacia lingvo kara al ni ambaŭ.

La dua konstato estas, ke ankoraŭ restas pluraj kampoj ne tuŝitaj per la Fundamento. En tiuj kampoj la kutimoj estas ankoraŭ formulataj, kaj diversaj redaktoroj aplikas diversajn normojn. Eble helpas eĉ al ili, se mi surpaperigus la 'normojn' kiujn mi adoptis.

Jam en alia loko, (Akademiaj Studoj, 1985), aperas mia esejo pri interpunkciadiko. La tie proponitaj konsiloj jam de longe fariĝis severe sekvataj reguloj por mi mem, kaj mi multe volas, ke redaktoroj

ilin egale rigore adoptu.

Fone al tiuj konsiloj estas konstato, ke taŭga interpunkciado grande helpas komprenon dum legado, kaj ke tion konstati estas aparte grava afero por ni, kiuj uzas la internacian lingvon por translingvolima intersanĝado de ideoj.

En la sama eldono de Akademiaj Studoj aperas mia listo de landonomoj en Esperanto, kvankam necesas agnoski jam, ke la listo ankoraŭ entenas kelkajn malglataĵojn. Korektigoj por ili estos baldaŭ proponitaj. Landonomoj uzataj en la Novajleteroj de IKEF senescepte sekvas la konsilojn en tiu listo.

Mi ĉiam sekvas ankaŭ la ligitan konsilon, ke derivaĵoj el landonomoj ĉiam aperas kun minusklo, kun la sola esceptode rektaj derivaĵoj el 'Esperantujo'.

Aliflanke, mi ĉiam uzas majusklon por titoloj antaŭ personaj nomoj, ĉu tiu titolo estas la modesta S-rino aŭ S-ro, aŭ la pli distingiga Akademiano aŭ Profesoro. Persona nomo ordinare portas titolon. Se pro kutimoj en aliaj landoj, oni sciigas al mi personan nomon sen titolo, tiu nomo akiras sub mia plumo la titolon S-ro, krom se pro pli frua sperto mi havas senton, ke la koncerna persono estas in-seksa, kiam la atribuita titolo estas Sinjorino.

Alia kampo por kiu mi adoptas minusklon estas tiu de valutonomoj, kun la sola escepto de la monunuo de la Esperantistoj, la Stelo.

Sekvo de tiu regulo estas, ke la mallongigoj simile aperas ĉiam en ordinaraj literoj: mallongigo por la germana marko estas g.mrk; la belga franko aperas kiel b.fr, la franca franko kiel fr.fr.; sv.fr. estas mallongigo por la svisa franko, kaj simile por aliaj valutoj.

Tre malkonsilinde, miaopinie, estas la uzado de iu kvazaŭ internacia normo kiu postulas la uzadon de majuskloj, aŭ de literoj kiuj ne apartenas al la alfabeto de la Fundamento.

Alia kazo de uzado de minusklo estas tiu de prononcohelpa transskribado de propra nomo. Tiun regulon mi adoptis por eviti la

akuzon, ke per transskribo kun majusklo mi 'donas' al alia persono nomon, kiun tiu persono eble ne pretas agnoski. Sekve, (kaj ĝi servu nur kiel ekzemplo de aplikado de la tiu ĉi regulo), la nomo de la ĉina ĉefministro aperus kiel Zhao Ziyang, (pr.: ĝao zijang), kvankam la germana poeto, Rikardo Sulco, agnoskas nomon en Esperanto kaj tial ricevus ĝin kvazaŭ normale kun majuskloj.

Iomete flanke rilate al la ĝeneralaj normoj, kiujn mi priskribis estas mia sinteno pri apartaj terminoj uzataj dise en la E.-gazeto.

Lastatempe, la Prezidanto de la Akademio de Esperanto, D-ro Andreo Albault, (pr.: albault), instruis al mi la signifon de la termino leksikologo, kiel persono kiu kolektas terminojn uzatajn, kaj ilin registras dum kunmeto de vortaro.

Sekvo estas, ke mi nun pli bone ol antaŭe komprenas mian mankon je fido en PIV, ĉar mi konstatas, ke la laboro de leksikologo limiĝas al kolektado, (de nove aperintaj terminoj), kaj ne de kontrolado, ĉu aŭ ne iu aparta termino, nove aperanta, estas la plej bone elpensebla por la aparta difino.

D-ro Albault klarigis, ekzemple, ke Profesoro Waringhien, (pr.: varingjen), dum kompilado de PIV renkontis la terminon, 'komputero', kaj ĝin registris, kvankam samtempe pensante pri ĝi, ke ĝi estas malkonsilinda formo. (Vidu la aludon je paĝo 20 de la Ĝenerala Antaŭparolo de PIV. Mi publike esprimas mian dankon al D-ro Albault pro atentigo.) Nu, ĉiuj laborantoj en la (siatempa) komputatora kampo (kampo en kiu mi tiutempe pangajne laboris), tuj rekonis, ke la formo 'komputero', estas erara formo.

Ni ne miru, do, ke ankaŭ D-ro Antal Münnich eraris: li elektis substantivan formon, 'komputilo', sed (verŝajne) ne rekonis, ke tiu formo trofacile invitas analizadon por malkovri kvazaŭan verbon, 'komputi'. Mi povas nur hipotezi, ke D-ro Münnich ne tiam sciis, ke la verbo 'komputi' jam ekzistas, kaj ekzistas kun signifo kiu malebligos tian rektan uzadon en la koncerna kampo.

Mi ne estas leksikologo. Por

mi pli gravas, ke adoptota termino estas plene fidinda ol ĉu iu verkisto ĝin jam uzis. Sen ia ajn dubo, la termino proponita flanke de Prof. Waringhien, sed ne registrita en PIV ĉar ĝi ne estis pli frue uzita, estas plene fidinda kaj plenfide rekomendinda. Por mi, komputoro estas komputoro.

Alia eraro flanke de leksikologo kaj registrita en PIV daŭre kaŭzas miskomprenojn. La termino, 'strikfonduso', (PIV, paĝo 302), estas sensencaĵo, malgraŭ la fakto, ke iu verkisto, (ĉu anglalingvano?), ĝin uzis; sed sekvoj de tiu erara registrado en PIV estas multaj eraraj nomoj, el kiuj la nomo, 'abonhelpa fonduso' de MONATO estas nur ekzemplo. Mi konsilas al ĉiuj legantoj kontroli en PV la signifojn de 'fondaĵo', (paĝo 137), kaj 'fonduso', (paĝo 18 en la Suplemento).

Kompreneble, ankaŭ proponantoj de terminoj povas erari. Elstara inter la (nur kelkaj) eraraj formoj en la Internacia Komerca/Ekonomika Vortaro, (IKEV), de S-ro Feliks

Munniksma kaj kunlaborantoj, estas tiu proponita por la imposto pro aldonita valoro. La proponita formo, 'aldonvalora imposto', klare ne taŭgas ĉar la imposto nenion aldonas al la valoro, sed, male, levigas pro la fakto, ke valoro estas aldonita antaŭ ol oni kalkulas la imposton. La erara formo, tamen, minacas esti ne-elradikebla, sekve de kutima uzado flanke de pluraj, (minimume tri), potencaj organizaĵoj.

Ni povas facile malkovri aliajn terminojn similajn, kaj el la cititaj verkoj kaj el aliaj vortaroj. La konstato, kiun ni devas eltiri el tio estas, ke kiam efektiva terminologia laboro efektive komenciĝos enkadre de nia Fakgrupo, ni eniros kampon en kiu abundas eblecoj erarpaŝi. Ju pli diligente ni preparos niajn labormetodojn, des pli valoraj estos la rezultoj de nia laboro. Nome de la Fakgrupo, mi invitas jam nun kontribuojn pri sekvindaj metodoj malpliigi la ŝancojn aldoni nian porcion al la stoko de eraroj.

Lorenc' Mi.

----- 0 -----oo----- 0 -----

Necesas re-pristudi la internacian komercon.

Noto de la redaktoro: De nia membro en Belgio, S-ro Roland Rotsaert, ni ricevis tekston kiu estas tro longa por nia modesta Novaĵletero, kaj kiu, cetere, estas jam proponita al alia revuo. La enhavo, tamen, bone kongruas kun tiu parto de nia agadprogramo kiu celas diskutigi aktualajn ekonomiajn situaciojn. Ni provas, sekve, doni en mallongigita formo la esencan analizon de faktoj kaj la indikojn por trovi solvon al:

La problemo de senlaboreco en Okcidenta Eŭropo.

Konsilindas unue atingi komprenon de la fona situacio en Belgio kaj la najbaraj landoj, kie aktuale validas la jenaj principoj:

- la registaro posedas aŭ kontrolas konsiderindan parton de la ekonomio;
- la civitanoj devas cedi grandan parton de siaj enspezoj al la ŝtato, sed aliflanke tiu ŝtato ilin prizorgas, se necese, ekde naskiĝo ĝis morto.

Oni povas izoli por konsidero du interligitajn problemojn. Inter

ili la ĉefa estas senlaboreco, kiu ĉie restas je nivelo de dek procento aŭ pli. Krom kaŭzi sociajn problemojn, tiu nivelo de senlaboreco havas grave malfavoran influon je la ŝtataj enspezoj. Senlaboruloj ja ne pagas impostojn, sed kontraŭe ricevas financon helpon por vivteni sin. Pro tio la tuta sistemo de socia sekureco riskas malekvilibriĝi.

La dua problemo, tiu de alta nivelo ĝenerale de rentumoj, nuntempe malpliigas, sed la niveldiferenco inter rentumo kaj inflacio

paĝo ok

estas daŭra minaco, en pluraj rilatoj. Kiam inflacio superis rentumon, unu rezulto estis kaŝita senlaboreco; nun kiam la niveloj invertiĝis, la rezulta falo en enspezoj ĝeneralaj videble akriĝas la problemon de malaperado de postenoj.

Ambaŭ faktoroj plifortigas unu la alian kaj riskas paralizi la tutan ekonomion kaj ruinigi nian socion. Rentuma politiko estas plejparte internacia afero; nur senlaboreco estas solvebla je pure landa nivelo.

Distingeblas du kaŭzoj por senlaboreco: malapero de postenoj pro aŭtomatigo de taskoj, kaj kreskanta nombro de postenserĉantoj, inter kiuj estas kreskanta frakcio de vironoj. Iama ekvilibro sur la labormerkato, sekvo de pluraj faktoroj, lastatempe malaperis, kaj oni serĉas metodon re-starigi ĝin.

Inter kelkaj proponitaj solvoj, neniu promesas fari pli ol iomete malakriĝi la bazan problemon, kaj ĉiuj entenas konstatablan riskon de plena malsukceso.

Dume, la daŭre alta nivelo de nedungiteco entrenas pliakriĝantan premon de sociaj problemoj, kaj, krome, malfavore influas sur la ĝenerala volo serĉi laboron aŭ apliki ideojn, kiuj eble kreus lab-

orpostenojn sub pli favoraj ĝeneralaj kondiĉoj. Sed tamen en la sociaj kaj kulturaj kampoj restas multe da taskoj neplenumataj, ĉar monrimedoj por tia laboro mankas kaj volo plenumi ĝin senpage pli kaj pli rariĝas.

La tuta problemaro pli kaj pli urĝiĝas, kaj multe da pripensado estas dediĉita al trovo de solvo.

Tiu pripensado koncentriĝas je metodoj pli racie dividadi la disponeblajn laborpostenojn sen grave minaci ĝeneralajn vivnivelojn pro reduktitaj salajroj. Inter eblaj solvoj estas deflankigi elpagojn de la ŝtato kaj impostadon de salajroj, kaj krei postenojn paralelajn al deviga militservperiodo.

Eblas, krome, rekte stimuli investadon per reduktado de la monbezonoj de la ŝtato, ĉar tia ago rekte tuŝus la nivelon de rentumo.

Necesas trovi metodojn fidindajn por ke la modernaj teknikaj malkovroj estu aplikataj al plibonigado de ĉies vivmedio.

Necesas re-pristudi la internacian komercon, ĉar ankaŭ komerco je granda distanco povas malfavore influi la situacion, se misefika.

Roland Rotsaert.

----- 0 ----- 00 ----- 0 -----
Tutmonda Esperantista Adresaro.

Ne-rekte ni sciigis lastatempe pri iniciato, kiu devas esti interesa por niaj membroj: la intenco prepari duan eldonon de la Tutmonda Esperantista Adresaro, (TEA).

La unua eldono de TEA, tiu de 1981-82, ankoraŭ validas en multaj rilatoj, sed pro la intereso kiun ĝi kaŭzis, multe pli da Esperantistoj volas esti registritaj por la nova eldono. Tiu unua eldono, en kiu troviĝas pli-malpli 2 700 adresoj, estas ankoraŭ havebla ĉe la eldonisto kontraŭ pago de kvin germanaj markoj, (inkluzive de la sendokostoj).

Info-Servo, Bismarckstr. 28, D-3550 Marburg, Okc. Germanio.

Por la dua eldono, oni nun fidas promesojn aĉeti la adresaron je eldono. La koston oni taksas esti naŭ germanaj markoj, (inkluzive de sendokostoj), sed nur kiam sufiĉe da promesoj estas jam faritaj al la eldonisto, oni faros mendon ĉe la presisto. Se sufiĉe da promesoj alvenos, povas esti, ke la vera prezo estus malpli ol la takso.

Indiku nun vian intereson en la afero! Petu informojn, per letero kun respondkupono, aŭ sendu monbileton de via lando kun egalvaloro de kvin markoj, al la eldonisto: